

starto de la reformoj en Bulgario. La problemoj de la transpaso oni pririgardas en kelkaj reciproke ligitaj aspektoj:

– problemoj, kaŭzitaĵoj de la malperfekta ekonomika leĝfarado,

– problemoj ligitaj kun la postrestado de ekonomika scienco de la mastrumadpraktiko,

– problemoj, kun kiuj estas konfrontitaj la privataj negocistoj.

La malfacilaĵoj en sia plej granda parto devenas el la nesufiĉa preparo kaj scipovo de la privatuloj en la sfero de la negocado, el la difektita psiko heredita de la deficitita ekonomiko kaj ĉefe el la makroekonomikaj ĉirkonstancoj de la disvolviĝo.

Adreso de la autorino:

Svetlana Panajotova

k-x "Tschaika", bl. 47, vk. A, ap. 4

BG 9005 Varna

BULGARIO

Intervjuo pri Hospitalo de Referenco en Latinameriko

En la koro de Havano, situanta en la tre loĝata municipo Centro Habana staras la Klinika Kirurgia Hospitalo "Hermanos Ameijeiras".

Kun siaj 24 etaĝoj de eleganta kaj moderna arkitekturo, kiu starigas fronte al la havana moleo, tiu institucio inaugurita en la jaro 1982 estis elektita dum 1991 kiel Fokusa Kunordigpunkto por la Hospitaloj de Referenco en Latinameriko.

Pro la graveco, kiun tiu fakto havas por la medicina scienco de la kontinento kaj speciale por Kubo, ni decidis intervui la direktoron de la institucio d-ron Raul Gomez Cabrera, kiu afable akceptis respondi kelkajn demandojn por la legantaro de Scienca Revuo.

SR: Kiun signifon havas por vi la nomumo de la Klinika Kirurgia Hospitalo "Hermanos Ameijeiras" kiel fokusa kunordigpunkto por la Hospitaloj de Referenco en Latinameriko?

RGC: Ĉi tiu nomumo posedas duoblan signifon kies ĉefaj facetoj estas la scienca kaj la politika. De scienca vidpunkto ĝi estas rekono al la evoluo de la kuba medicino pro ĉio kion ĝi reprezentas por la nacia popola sano. Politike estas paŝo al la konkretigo de la latinamerika integriĝo, kiu lau nia juĝo estas realigebla ne nur en la ekonomia kampo, sed ankaŭ en la medicino, kampo en kiu ni volas kaj povas ĝin efektiviĝi.

Ĉi tiu moderna hospitalo, kies nuna prestiĝo estis konkerata kun dediĉo kaj peno, estas elokventa elmonro de la atingoj de la kuba medicino. Ĝia scienca laborado por la bono de la popola sano altiris al ĝi tre meritoplenan prestiĝon.

SR: Kiel vi taksas la laboron realigitan de via institucio dum la lastaj kvin jaroj?

RGC: La Hospitalo havas kiel ĉefan celon enkonduki novajn teknikojn kaj teknologiojn. Dum la unua kvinjara periodo oni dediĉis sin al la enkonduko de

signifa nombro da tiuj teknikoj kaj teknologioj en nia lando. Dum ĉi tiu periodo oni aĉetis la ekipojn por la realigo de greftado de medicin–teknika progreso kiel komputilojn kaj la ilaron por mikrokirurgio kaj aliajn ekipojn de la plej avangarda teknologio. Dum la lasta kvinjarperiodo, krom la enkonduko de novaj medicinaj metodoj, nia baza laborlinio direktiĝas al la plifirmigo de la ĉefaj aranĝoj al kiuj konsakriĝas la institucio.

SR: Kiuj estas la ĉefaj laborlinioj de scienca evoluo, kiujn celas la institucio por la venontaj jaroj?

RGC: Ĉefe oni entreprenas la kirurgion "de minimuma aliro". Inter ili la trahauta disektomio, la laparotomia kolecistektomio, la ekstereotaksika radiokirurgio, la fermita radiokirurgio kaj aliaj. Krom tio oni daurigas laborante por perfektigo de la teknikoj jam establitaj en la instituto.

Dotita de komfortaj ĉambroj, poŝtoŝeĵo, biblioteko, komputilcentro, parkadejo kaj propra teatro, kie oni okazigas sciencajn kunvenojn kaj projekcias filmojn por distrado de la enhospitaligataj pacientoj, la Hospitalo estas en sia tuto ne nur kreaĵo humana, sed ankaŭ bela kaj funkciiva.

SR: Kiel integriĝas la hospitalo al la kuba sansistemo kaj kiun rolon ĝi ludas en tiu direkto?

RGC: La hospitalo havas duoblan funkcion. Ĝi estas nacia centro de referenco por la enkonduko de ĉiuj novaj ekipoj kiujn oni aĉetas kaj krome estas rekapabla centro de fakuloj el la tuta lando; siavice ĝi apartenas al la Nacia Sansistemo prizorgante du municipojn de Havano, kies loĝantaro sumas je 300000 homoj, al kiuj aldoniĝas 9 poliklinikoj kaj ĉirkaŭ 200 konsultejoj de la institucio Familia Kuracisto. Tio implicas ke krom esti centro de alta teknologio la hospitalo ankaŭ plenumas sian respondecon rilate al la baza sanprizorgado de la popolo.

SR: Kiujn servojn liveras la institucio kaj kiuj estas ĝiaj eblecoj oferti

sciencian konsiladon al la Latinamerika regiono?

RGC: Ĉi tio estas klinika–kirurgia hospitalo kiu havas 38 fakojn dotitajn de avangarda teknologio. Menciendaj estas la Nuklea Magneta Resonanco, ekipo por Eksterkorpa Litotricio, linea akcelilo por la kuracado de diversaj tumoroj, komputiligita Aksa Tomografio; kompreneble en ĝi laboras personaro konsistanta el ĉefaj personecoj de scienca prestiĝo nacie– kaj internaciskale, pro kio, krom la nacia rekapabligo, ni ofertas pli ol 60 internaciajn kursojn por pretigado de kuracistoj, ĉefe latinamerikaj.

Krom du gimnastikejoj por kardiologio kaj fizioterapio respektive je cent metroj de la centra hospitalo situas trietaĝa konstruaĵo apartenanta al la institucio kaj dediĉata en sia tuto al testoj pri nuklea medicino, kancerologio kaj radiokuracado de pacientoj enhospitaligitaj kaj ne.

SR: Ni scias pri la kreskanta prestiĝo atingita de la kuba medicino ekde 1959; kion vi opinias ĉi–rilate?

RGC: Mi pensas, ke la evoluo kiun ni havas en la kampo de medicinaj fakoj estas kondiĉata de la solvo de la plej gravaj malsanoj kiuj kausas la morton de la civitanaro. La infektaj malsanoj, la nutromanko kaj la purecomanko troviĝis inter la ĉefaj mortokausoj.

En ĉi tiu momento nia popolo estas vakcinata, nia nutronivelo – lau la FAO (Monda Nutro–Organizo) – estas inter la unuaj de Latinameriko, la sociaj vivkondiĉoj estas eksterordinare pli bonaj ol antaŭe kaj pro tio nia situacio en rilato al malsaniĝo kaj mortoversajneco estas simila al tiu de evoluintaj landoj, tiel ke ni havas mezan vivoesperon de 75 jaroj, infanan mortofrekventon egala al 10.7 po 1000 kaj supervivadoŝancon por la infanoj de malpli ol 5 jaroj egala al 98.7 %. Kiel vi konstatas, tio signifas radikalan ŝanĝon en la sansituacio de nia popolo en komparo kun la jaro 1959.

SR: Fine, kiun signifon havas por vi la respondeco direkti la plej modernan kaj komfortan kuban hospitalon, kiu krom tio nun estas grava institucio por

evoluiĝo de medicinaj servoj en Latinameriko?

RGC: Krom esti grandega respondeco ĝi estas samtempe enorma ĝojo direkti aron da laboristoj kaj sciencistoj tiom valoraj kaj ankaŭ atestas la fidon, kiun oni donis al ni por zorgado de la altvaloraj rimedoj, kiujn la institucio enhavas.


SR: La tempo elĉerpiĝas. Ankaŭ la intervjuanto laboras en ĉi tiu hospitalo kaj kompreneble ni devas dediĉi nin al la ĉiutagaj laboroj. Nun restas al ni adiaŭi ĝian direktoron, deziri al li sukceson en sia laboro, kiu estas ankaŭ la nia, por la bonfarto de ĉiuj latinamerikano, kaj speciale de la kubanoj kaj elkore danki d—ron Gomez Cabrera pro liaj vortoj por nia revuo.

Intervjuis por Scienca Revuo:


Juan Lazaro Besada Toledo
 Gervasio n-ro 62, apto 3, 2^o piso e./ Lagunas y San Lazaro
 C 10200 CIUDAD HABANA 2
 CUBA




La konstruaĵo kaj la parkejo



Ĉambro por
 enhospitaligo



Ekipado por ekster
 korpa litotricio



Servo de superprema
 oksigenado